

Redakcia Informo

La tria kajero de volumo 49 (1998) aperas sen plialtigo de la kotizo.

En la unua artikolo prezentas prof. H. Nagata esplorojn kaj spertojn pri lingvouzado kaj lingvoscio helpe de vortdifinado ne nur ĉe infanoj, sed ankaŭ ĉe plenkreskuloj. La rezulto konfirmas nur parte skolajn supozojn.

Sekvas ISAE-prelego el la dua parto de la Jarkunveno enkadre la 83a Universala Kongreso. D-ino Korjenskaja-Gouriou priparolas la interrilatojn kaj diferencojn inter futurismo kaj dadaismo, antaŭ ĉio en la Rusio antaŭ kaj post komenco de la revolucio.

En plua prelego dum la Jarkunveno en Montpellier informis ISAE-ano d-ro A. Albault pri Ortografio Internacia. Pri la tiurilata problemoj jam aperis teksto en SR 48 (1997)(3) sub alia titolo, pro tio estas nur publikigita la tabela reprezentado de la esencaj alfabetaj vidpunktoj. En tiu konekso staras mencio de libro recenzita en MONATO kaj havebla ĉe UEA.

La ISAE-prelego de s-ro N. Rasic, kiun ni petis komenti la labormetodojn por sia libro 'La Rondo Familia', havis grandan simpatian sukceson; ni volas nur atentigi ĉi tie al la libro mem, kiu estas havebla ĉe la UEA-libroservo; pri ĝi jam aperis recenzo en SR 1998 (1).

En interesa literatura kontribuo pritraktas d-ino A. T. Ivanova konservativajn sintenojn de konataj germanaj aŭtoroj kontraŭ la naturalismo.

Filozofia artikolo, kiu rilatas al proprecoj de la Senfino, kontribuis prof. J. L. Cindra; ĝi certe trafas la intereson de la natursciencistoj.

Estas prezentita la aktuala medikamento *Viagra™* lau strukturkemio kaj funkcia aspektoj.

Sekvas recenzo de R. Hauger pri unuafoje traduko de ilustrita infanlibro en la *Bliss*-simbollingvon kun priskribo de tiu komunikadsistemo kaj ties signifo por handikapitaj gejunuloj.

Sciigo de la ĝenerala sekretario pri la Jarkunveno en Montpellier:

Ĉar UEA ne kapablis, publikigi en la Kongresa Kuriero la raporton pri la ISAE-Jarkunveno enkadre la UK en Montpellier je la jaudoj, mi devas informi niajn membrojn ĉi tie, ke la 'Propono pri Statuŝanĝo', publikigita en n-Bult 1998(1), estas retirita kaj ankaŭ ne plu estas por diskuto. Validas do Statuto kaj Regularo reviziitaj en 1991.

Difinado de Vortoj ĉe Infanoj kaj Plenkreskuloj: Rilato inter Lingvouzado kaj Lingvoscio

Hiroshi NAGATA (JP)

Resumo

Tiu ĉi artikolo prezentas, kiel 3 jarojn aĝa knabino difinis vortojn, kiujn ŝi uzis preskaŭ senerare. Ŝia difinado de la vortoj, precipe tiuj kategorioj el verbo kaj adverbo, estis ne difinado en la aŭtentika senco, sed montris tian aspekton, ke la vortoj estis nur enmetitaj en la frazoj, kiujn ŝi konstruis kiel difinado, kaj kiuj ne rekte rilatis al la vortoj. La difinado de tiu speco estis observata eĉ ĉe plenkreskuloj, kvankam malofte, kiam ili difinis la adverbojn. Krome, ilia difinado de la adverboj konsistis plejparte el simplaj sinonimoj de la adverboj. Trovaĵoj sugestas, ke lingvouzado ne postulas plenan posedon de metalingvistika lingvoscio, tiel ke ĝi eblas tutplene sen sufiĉa lingvoscio. Tiu ĉi konstato kontraŭas al la tezo laŭ Chomsky: eĉ neplena lingvouzado nepre postulas riĉan lingvoscion.

Enkonduko

Granda amaso da antaŭaj studoj pri lingvoakirado en infanoj celas priskribi kaj analizi la aktualan proceson en komprenado kaj produktado de apartaj lingvoj. Tamen ne tiel multaj estas studoj, kiuj sin direktas al metalingvistika konscio (*metalinguistic awareness*) pri la lingvo, kiun ili mem uzas aŭtomate kaj senkonscie. La metalingvistika konscio estas speciale bezonata, kiam infanoj provas reflektivon atenton al la lingvo mem. Iuj studoj sin turnas al la evoluo de la konscio pri fonologio, vorto, sintakso, semantiko aŭ pragmatiko de iuj lernataj lingvoj (Tunmer, Pratt, k Herriman, 1984; Gombert, 1990), aliaj sin turnas al la rilato inter metalingvistika konscio kaj evoluo de sciado (Hakes, 1980; Pratt k Grieve, 1984), kaj aliaj plue al la lingvistika konscio rilate al la lernado de legado (Tunmer k Bowey, 1984).

La metalingvistikan konscion ni rigardas en tiu ĉi artikolo kadre de la lingvoscio, posedata de infanoj aŭ plenkreskuloj, en donita nivelo de lingvoakirado. Ni prezentos ekzemplajn difinadojn, kiuj, ni kredas, plej klare montras kiel status la lingvoscio de parolantoj. La artikolo estas organizita en kvin sekciojn. La unua sekcio priskribos kelke da antaŭaj studoj traktantaj la manierojn, en kiuj infanoj difinas vortojn. La dua sekcio montras ekzemplajn difinadojn pli-malpli celkonscie eltiritajn el la filino de la aŭtoro, eksplikante kian signifon ili havas pri sia lingvoscio. La tria montras kiel status la lingvoscio posedata de plenkreskuloj kiuj, laŭ Chomsky (1986) kaj samskolanoj, jam atingis la finan staton de la lingvoakirado. La kvara konsideros la rilaton inter lingvouzado kaj lingvoscio, kontraŭmetante nian vidpunkton kontraŭ tiu de Chomsky (1986, 1988). Kaj en la lasta sekcio ni prezentos proponon, kiu servus kiel alternativo al la lia.

I. Kiel infanoj difinas vortojn?

Difini vortojn per aliaj vortoj postulas de infanoj metalingvistikan kapablon (Clark, 1978; Wehren, de Lisi k Arnold, 1981; Watson, 1985; McGhee-Bidlack, 1991). Diversaj studoj utiligas diversajn terminojn por priskribi la manierojn, kiujn alprenas infanoj en malsamaj niveloj de lingvoakirado. Ili indikas, ĝenerale, ke infanoj emas unue difini iun vorton per la funkcio, kiun plenumas la objekto aŭ agado menciita de la vorto, kaj poste per la funkcio kombinita kun konkretaj kaj percepteblaj trajtoj de la objekto aŭ agado. Difinado per funkcio temas nur pri la uzebleco de la objekto aŭ la ago, kiun la objekto kapablas plenumi. Ekzemple, pilkon infanoj priskribas kiel ion kiu 'ruliĝas' aŭ 'saltas'; kaj libron kiel ion, kion ili 'legas'. Dume, difinado kun konkreta kaj perceptebla trajtoj inkluzivas la atributon de pilko kiel, ekzemple, 'ronda'; libro estas priskribata kiel io, kiu havas multe da paĝoj kun vortoj kaj/aŭ bildoj. Tiu ĉi evoluo de vorto-difinado, sekvas do, kiel asertas Wehren k.a. (1981), la vojon, kiun Nelson (1974) skizis pri la evoluo de vorto-signifo. En ĉi tiu respekto, funkcia informo ŝajne

estas rigardata de infanoj pli kerna, en la evoluoj kaj de vorto-signifo kaj de vorto-difinado, ol konkretaj kaj percepteblaj atributoj, kiuj estas ne tiel stabilaj ol tiuj de funkciaj trajtoj.

Necesus aldoni, sekve de Litowitz (1977), du aliajn etapojn al la supre donitaj du etapoj de vorto-difinado. Unu etapo antaŭas la difinadon per funkcio, t.e. la etapo, en kiu infanoj simple donas apartajn vortojn, kiuj estas asocie kunligitaj al la testita vorto en ilia memoro. Ekzemplojn inkludas tiaj respondoj kiel 'ŝtrumpeto', 'kapo' kaj 'martelo' respektive al 'ŝuo', 'ĉapelo' kaj 'najlo'. La alia etapo estas tiu, kiu sekvas la etapon, en kiu infanoj difinas vortojn laŭ konkretaj kaj percepteblaj atributoj kune kun ties funkcio. En tiu ĉi etapo la infanoj utiligas iujn difinitivajn kaj pli abstraktajn kadrojn por difini vortojn. Ekzemple, 'ŝuo' estas difinata kiel 'io, kion vi surmetas al vi sur la piedo,' konforme al la esprimkadro: 'estas io (klaso) kiu (atributo) aŭ (trajto) (ie) (iamaniere)'.

La evoluo de difinado ĉe infanoj estas tiel, unuvorte, ekde difinado individue karakterizita al socie komuna, same kiel ekde difinado konkreta al abstrakta (Al-Issa, 1969; Litowitz, 1977; Watson, 1985). La evoluo skizeblas ankaŭ kiel la transiro de kunteksto-dependa al kunteksto-sendependa difinado (Werner k Kaplan, 1963).

II. Vorto-difinado en unu infano

Ni nun prezentas kelke da ekzemplaj difinadoj, kiujn mi celkonscie, tamen ne sisteme, eltiris el la japana infano, filino de la aŭtoro. Ili baziĝas sur la donitajoj skribitaj en taglibro pri gubernado. En suba registro, eldira situacio estas donita en rektaj krampoj; japanaj eldiroj en kursivaj literoj; kaj Esperantaj tradukoj malstrikitaj en ordinaraj presliteroj kaj en rondaj krampoj. Mallongigoj estas P por ŝia patro, kaj F por filino, kun numero, montranta la ordon de eldiroj. Numeroj en krampoj indikas ŝian aĝon, ekz. (3;1) montras la aĝon de 3 jaroj kaj 1 monato.

1. (3;1)¹[En banujo.]

P1: *Kitte nakanaka konai ne.* (Stampoj ankoraŭ ne venis, ĉu?)

F1: *Konai ne. Ĉikokuŝita no kamo ŝirenai ne, ĉikoku ŝitanĉa nai ka na.* [Ne. Ili povus malfruiĝi. Kredeble ili povus...]

[Ekster la banujo, la patro, forgesinte tion, kio estis malfruiĝinta, demandis al la filino.]

P2: *Nao, ĉikoku ŭa nandatta kana?* (Nao (karesnomo de la filino). Kio estis tio, kio malfruiĝis?)

F2: *Kitte deŝo, motomoto.* (La stampoj, pri kiu ni tiam parolis.)

P3: *Motomoto-tte dooiu imi?* (Kion signifas *motomoto*?)

F3: *Anone, niĉijobi ni motomoto-tte itta hazu dakedo.* (Nu, en pasinta Dimanĉo mi devus diri *motomoto*.)

2. (3;8)

F1: *Ikukoto ga kanarazu ŭakatta.* (Mi nepre komprenis iradon.)

P1: *Kanazu-tte dooiu koto?* (Kion signifas *kanarazu*?)

F2: *Kanarazu-tte iu koto ŭa ikukoto ga ŭakatta-tte iu koto.* (*Kanarazu* signifas, ke mi komprenas iradon.)

3. (3;9)

P1: *Sukkari-tte dooiu koto?* (Kion signifas *sukkari*?)

F1: *Sukkari mienakunatta-tte iu koto.* (*Sukkari* signifas, ke (io) ne plu videbliĝis.)

4. (3;9)

P1: *Ippai-tte dooiu koto?* (Kion signifas *ippai*?)

F1: *Ippai tamaru-tte koto. Ĉokinbako mo ippai ni naru deŝo.* (*Ippai* signifas, ke io pleniĝas. Ankaŭ pleniĝas ŝparmonujo, ĉu ne?)

En supraj parolturnoj aperas kvar vortoj, *motomoto* (dekomence, devene, denaske), *kanarazu* (nepre, absolute), *sukkari* (tute, plene,

¹Gravas indiki, ke la infano ne povis doni klarigon al la vorto, *motomoto*, kiam ŝi havis 2 jarojn kaj 11 monatojn, kiel videblas en la sekvanta parolturno.

[Petante la patron transdoni al ŝi albumon.]

F1: *Sore o Nao ni motomoto kaŝite.* (Pruntedonu ĝin al Nao *motomoto*.)

P1: *Motomoto-tte nanda?* (Kion signifas *motomoto*?)

F1: *Nao ŝiranai.* (Nao (Mi) ne scias.)

perfekte, komplete), *ippai* (plene, senmanke), interesaj laŭ ties uzmanieroj. La uzado de la vorto, *motomoto*, ne estas adekvata en 1. F2, supre. Ŝian intencon tamen ni povas supozi helpe de la kunteksto. Malgraŭ ke temis pri la stampoj, pri kiuj ŝi kaj la patro estis parolintaj en la banujo, la patro ekster ĝi forgesis tion. Utiligante la vorton, *motomoto*, ŝi celis lasi la patron reveni al la fiksita tempo en la pasinteco. Ankaŭ la adverbo, *kanarazu*, estas malprave aplikita: ĝi devus esti anstataŭigebla per la adverbo, *bone*. Kontraŭe de tiuj ĉi du uzadoj, ŝiaj uzadoj de aliaj du adverboj, *sukkari* kaj *ippai*, respektive, en 3.F1 kaj 4.F1, estas tute akcepteblaj.

Notu, tamen, ke ŝi utiligis komunan strategion, kiam ŝi klarigis la signifon de ĉiu el la kvar vortoj, spite de sukceso aŭ malsukceso de la klarigo. Ŝi provis difinadon helpe de la kunteksto, enmetante la krizan adverbbon en la frazon por ŝi plej facile rememoreblan el la memoro. Ŝia difinado de vortoj do ne similas al tiu montrita en la sekcio II. Ĝi ne estas difinado en la preciza senco de la vorto, ĉar kreita frazo neniom indikas la signifon de la vorto. Anstataŭe, la vorto estas simple enmetita en la frazkunteksto, kiun ŝi kreis laŭ sia propra sperto. La difinado de tiu ĉi speco similas al tiu de la plej primitiva etapo laŭ Litowitz (1977), nome: infanoj donas al la demandita vorto respondon per frazo anstataŭ per vorto. Nura diferenco inter la du respondoj koncernas evoluantan nivelon de lingva kapablo: kvankam infanoj en ambaŭ niveloj fidas al la meĥanismo de asociado, unuopaj infanoj, malpli evoluintaj, respondas per aparta(j) vorto(j), dum aliaj infanoj, pli evoluintaj, respondas per frazo.

Kritikantoj levas demandon pri tio, ĉu tiu ĉi infano kapablas kompreni la demandformon eksplicite aŭ implicite enhavantan la vorton, *signifo*. Aliaj esploristoj (Al-Issa, 1969; Wolman k Barker, 1965; Swartz k Hall, 1972; Litowitz, 1977; Wehen, k.a., 1981; Watson, 1985; McGhee-Bidlack, 1991) testis infanojn kun la aĝoj pli ol 4 jaroj kaj 5 monatoj. Notu, tamen, ke Slobin (1978) observis ĉe sia filino tiajn metalingvistikajn vortojn kiel *mean* (signifi) kaj *be*

called (estas nomata) argumentante, ke "klare ekzistas ĉe tre junaj infanoj la kapablo pripensi formon, signifojn kaj uzadon de vorto (p.54)." Ankaŭ nia infano montris sian plenan kapablon kapti la signifon de la vorto *signifas*. Tion oni povas vidi, kiam ŝi (3;11) difinis la vorton, *libro*, kiel *io*, *kion oni legas*. Sekve ni povas konfide lasi al ŝi sufiĉe da kapablo kompreni la metalingvistikajn vortojn. Krome, la japana frazelemento, *-tte-koto*, enhavas en si tiajn signifojn kiel 'signifas', 'estas, ke...', k.s. Tiam kapablon ŝi devus, do, provi, kiam ŝi difinis vortojn ankaŭ el aliaj vortformoj.

Tabelo 1 prezentas pli da aliaj ekzemploj. Ili ĉiuj estas samspecaj, kiel tiuj difinadoj supre montritaj. Nepras nun aldoni, ke uzado de la vortoj en Tabelo 1, escepte de tiu de la supraj ekzemploj, 3.N1 kaj 4.N1, estas laŭkuntekste adekvata kaj plene akceptebla. Tio ĉi fakto reliefigas la malegalecon inter ĉiutaga uzado de lingvo kaj ties metalingvistika konscio. Oni do povus apartigi du tipojn de lingvoscio, nome tiu, kiu ebligas al homoj adekvatan uzadon de lingvo en komprenado kaj produktado, tute senkonscie pri la uzata lingvo mem, kaj tiu, kiu ebligas al ili konscie pripensi la lingvon mem kaj ties uzadon. La kurantaj trovaĵoj klare indikas, ke ĉiutaga lingvouzado ne nepre postulas metalingvistikan lingvoscion.

Tabelo 1

1. *icumo* (ĉiam): Otoosan ŭa *icumo* oŝigoto ŝitemasu-tte koto.
([Ĉiam estas, ke] la patro ĉiam laboras.)
 2. *Aŝita* (morgaŭ): *Aŝita* niŭa nani suru no kana-tte koto.
([Morgaŭ estas, ke] kion [mi] faros morgaŭ.)
 3. *Zettai* (certe): *Aŝita* kara *zettai* makenai-zo-tte koto.
([Certe estas, ke] [mi] certe ne malvenku ekde morgaŭ.)
 4. *Aruku* (piediri): Okaimono ŝitari suru toki *aruku-tte-koto*.
([Piediri estas, ke] [oni] piediras kiam [oni] faras aĉeton.)
 5. *Futteiru* (falas/pluvas): Ame toka ŝaŭaa toka ga *furu**-no.
([Falas/Pluvas estas, ke] pluvo aŭ duŝo falas.)
- * '*Furu*' estas la infinitivo de '*futteiru*', kiu montras daŭrantan staton de la verbo.

Tabelo 1 montras kzemplajn difinadojn de verboj kaj adverboj observitaj ĉe japana infano, 3 jarojn kaj 11 monatojn aĝa (3;11). La tradukitaj frazelementoj en la rektaj krampoj estas suplemente aldonitaj.

III. Vorto-difinado ĉe plenkreskuloj.

En tiu ĉi sekcio ni prezentos trovaĵojn akiritajn ĉe plenkreskuloj, kiuj laŭpetite provis difini la suprajn 10 vortojn, donitajn miksite kun aliaj 10 vortoj. Dudek-kvar universitataj studentoj, 22 virinoj kaj 2 viroj, en la mezaĝo de 19.3 jaroj, plenumis du taskojn por ĉiu vorto, nome: difinado de la vortoj kaj konstruado de ekzempla frazo enhavanta en si la donitan krizan vorton. Tiun ĉi teston ni provis, por ke evidentiĝu la malegaleco ĉe malfacileco, kiun kredeble spertos plenkreskuloj inter difinado kaj uzado de adverboj, uzataj preskaŭ senerare eĉ fare de infanoj 3 jarojn aĝaj.

Observitaj difinadoj de la testitaj vortoj estis laŭtrajte klasifikeblaj jene:

(a) Aŭtentika difinado: al tiu ĉi klaso apartenis tiaj difinadoj, kiaj aludis la agadon, staton, manieron aŭ aliajn ecojn por verboj kaj adverboj unuflanke, kaj percepteblajn kaj/aŭ funkciajn trajtojn por substantivoj aliflanke. Ekzemple, *ippai* (plene, senmanke) devis aludi la staton de *io*, kio enhavis kvanton, kiun ĝi entute povis havi.

(b) Simpla anstataŭigo per sinonimoj: tio ĉi ne estis difinado en la aŭtentika senco, ĉar la krizaj vortoj estis simple anstataŭigitaj per aliaj vortoj aŭ sintagmoj pli-malpli sinonimaj. Do anstataŭiganto facile povis preni la lokon, kiun prenis la kriza vorto. Ekzemple, *kanarazu* (certe, nepre) estis difinita kiel *zettai* (absolute), tiel ke 'Tio estas *certe* (*absolute*) utila materialo.'

(c) Situacio-dependa frazkompletigo: al tiu ĉi klaso apartenis tiaj difinadoj, kiaj nek inkludis aŭtentikan difinadon nek anstataŭigitan sinonimon, sed simple frazon aŭ substantivan sintagmon kiu, se kombine uzita kun la kriza adverbo, rilatis iamaniere al ties signifo. Tiu difinado aperis 4 foje por tri testitoj, nome: du testitoj por la

adverbo, *kanarazu*, kaj unu testito por la du adverboj, *kanarazu* kaj *sukkari*. Aktualaj difinadoj estis jenaj:

a) *kanarazu* (certe, nepre):

- 1) *Sono monogoto o mamoranakereba ikenai.* (Tion oni devas obei.)
- 2) *Jotei dori ni suru toki no jakusoku.* (Promeso laŭ kiu oni faras ion.)
- 3) *ŭasurete ŭa naranai koto.* (Io ne forgesenda.)

b) *sukkai* (plene):

- 1) *Subete no mono ga nakunatte ookata nakunatte ŝimau.*
(Ĉio elĉerpiĝis, kaj preskaŭ elĉerpiĝis.)

En ĉiuj supraj kazoj bone staras la krizaj vortoj, se enfiksitaĵ en ties respektiva difinado, tiel ke, ekz., 'Oni (nepre) devas obei tion,' 'Ĉio preskaŭ (plene) elĉerpiĝis.'

(d) Neniu respondo: aliĝis al tiu ĉi klaso neniu respondo al la kriza vorto. Surprize estas, ke eĉ plenkreskuloj ne povis doni difinadon al la adverboj, uzataj preskaŭ senerare fare de 3-jaraj infanoj.

Tabelo 2 montras frekvencon de la kvar tipoj de respondoj donitaj al 10 vortoj, kune kun elcento de la frekvenco de aŭtentikaj difinadoj, kiu okupas tutan nombron da respondoj. (Notu, ke sumado de frekvencoj en ĉiu vico estas pli granda ol la tuta nombro da testitoj. Tio okazis pro tio, ke ni nombris aparte plurajn respondojn donitajn de iu testito al iu vorto.)

La Tabelo montras tri punktojn menciindajn:

- unue, aŭtentikaj difinadoj aperis plejparte en la verboj kaj substantivoj, dum ĉe la adverboj aperis simplaj sinonimoj pli ofte ol aŭtentikaj difinadoj, escepte de *ippai* (plene);
- due, okazis kvarfoje situacio-dependa difinado;
- trie, okazis, eĉ se malmulte, neniu respondo nur al la testitaj adverboj.

Tabelo 2

	(a)	(b)	(c)	(ĉ)	(d)	(e)
Adverboj:						
<i>motomoto</i>	7	18	0	0	25	28.0
<i>kanarazu</i>	4	23	3	1	31	12.9
<i>sukkari</i>	4	23	1	2	30	13.3
<i>ippai</i>	19	18	0	0	37	51.4
<i>icumoto</i>	8	29	0	0	37	21.6
<i>zettai</i>	9	18	0	1	28	32.1
Verboj:						
<i>aruku</i>	22	2	0	0	24	91.7
<i>futteiru</i>	22	2	0	0	24	91.7
Substantivoj:						
<i>aŝita</i>	25	0	0	0	25	100.0
<i>hon</i>	22	5	0	0	27	81.5

Tabelo 2: Frekvencoj de kvar tipoj de difinado donita fare de plenkreskuloj:

- (a) aŭtentika difinado;
 - (b) sinonimoj;
 - (c) situacio-dependa frazkompletigo;
 - (ĉ) neniu respondo;
 - (d) tuta nombro da respondoj;
 - (e) elcento de (a) en (d)
- Notoj: *motomoto*: dekomence, devene, denaske;
kanarazu: nepre, absolute;
sukkari: tute, plene, perfekte, komplete;
ippai: plene, senmanke;
icumoto: ĉiam;
zettai: absolute, nepre;
aruku: piediri;
futteiru: falas;
aŝita: morgaŭ;
hon: libro.

Koncerne la alian taskon, en kiu la testitoj estis postulitaj konstrui iun frazon inkludantan la krizan vorton, ne necesas detala priskribo. Ĉiuj testitoj kreis frazekzemplon akcepteblan al ĉiu vorto plej facile.

La studentoj poste skribis, laŭpetite, kiel ili prikonsideris la du taskojn. Menciinde estas, ke ili senescepte skribis pri tiom da grandega peno, kiom ili unufoje spertis, kiam ili donis signifon pri la adverboj, pridubante kial ili ne kapablis klarigi la signifon de la vortoj, malgraŭ ke ili ĉiutage uzis la krizajn vortojn en plej facila maniero.

IV. Lingvouzado kaj lingvoscio

La 10 vortoj, kies difinado eltiriĝis el la nuna infano, estas la vortoj ofte uzataj de japanaj infanoj. Ĉiuj vortoj, escepte de tri adverboj, *motomoto*, *kanarazu* kaj *sukkari*, estis uzataj sensange de tri infanoj, 3 jarojn aĝa (Iŭabuĉi k Muraiŝi, 1976). Estus do certe, ke ili sin trovas ordinaraj eĉ en la vortrezoro de 3-jaraj infanoj.

Tie ĉi ni turnu la atenton nur al la adverboj, kiujn infanoj kapablas uzi en komprenado kaj produktado kvazaŭ ili scius la signifon de la vortoj, eĉ se ili ne kapablas doni la adekvatajn difinadon al la vortoj. Tia observaĵo pri la malegaleco inter lingvouzado kaj lingvoscio estas jam ofte diskutita (Vygotsky, 1962; Hirsh-Pasek, Gleitman k Gleitman, 1978; Flores d'Arcais, 1978; Slobin, 1978; Gombert, 1990). Vygotsky (1962) argumentas, ke "la infano prilaborus subordigan propozicion inkludantan tiajn vortojn kiel *ĉar*, *kiam* kaj *sed* multe pli frue ol li efektive komprenas rilatojn mem, aŭ kaŭzan, aŭ kondicionalan, aŭ temporalan (p.42)." Flores d'Arcais (1978) ankaŭ diskutas la infanan uzadon de konjunkcioj: "... (la infano) adekvate prilaborus ilin (konjunkciojn) en iuj kunteksto, kvankam lia lingvoscio estas tre limigita kaj malsama de la lingvoscio de plenkreskuloj" (p.136). Tiuj argumentoj, kune kun diversaj observaĵoj inkluzive de tiuj de

la nuna artikolo, indikas, ke infanoj ne scias pri ĉio ajn, kion ili povas demonstri per la sukcesa uzado de lingvo.

Ke infanoj akiris uzadon de vortoj antaŭ ol ties signifon, estas la aserto, kiun prezentis Nelson kaj ŝiaj kunesploristoj (Nelson, Hampson k Shaw, 1992; Levy k Nelson, 1993), plej klare:

"... koncerne la vortojn, malpli travideblaj ol vortoj rilatantaj al bazaj objektoj, kaj ne rekte rilatigeblaj al la konceptotrezoro posedata de infano, infanoj akirus vortformon kaj uzus ĝin en aparta sintaksa/diskursa kunteksto en la maniero, kiu lasas sin aspekti bona por la orelo de plenkreskuloj. En la daŭro de tia uzado kaj notado iom post iom kreskas signifo al la vortformoj. Necesus tamen jaroj por tiu ĉi kreskado. Plejparto da infanoj, ekzemple, ne ĝuste komprenas tiajn vortformojn kiel *yesterday* (hieraŭ) kaj *tomorrow* (morgaŭ) ĝis la aĝo de kvar aŭ kvin jaroj, kvankam la uzado de tiuj ĉi vortformoj laŭraporte aperas ĉe tri infanoj, 1 jaron kaj 8 monatojn, el tiu ĉi infanoj testitaj" (Nelson, k.a., 1992, p.81).

Ŝajnas do, ke la uzado de vortoj ne necese egalas al posedo de ties signifoj, kaj krome, ke tiu sendube antaŭiras tiun ĉi. Sekve, unuavide plena uzado de vortoj ne necesigas infanojn posedi plenan scion de ties signifoj. Tiu ĉi karakterizado de la malegaleco inter uzado kaj scio de vortoj, ni kredas, plej bone klarigas la donitaĵojn supre montritajn pri la infano kaj la universitataj studentoj.

Notindas plue, ke tiu ĉi malegaleco ne plene estas nuligita eĉ ĉe plenkreskuloj. Tion klare montras difinadmaniero de iuj studentoj, kiuj malsukcesis ĉe iuj adverboj, kaj kiuj alprenis situaciondependan frazkompletigon, pli-malpli infanecan. La introspektoj kolektitaj post la esploro krome indikis malfacilaĵojn kaj mankon de memfido, kiujn la studentoj estis spertintaj dum la testado. La trovajoj de la nuna esploro do sugestas, ke eĉ plenkreskuloj ne perfekte scias la signifon de la vortoj, precipe de la vortoj, kiuj rilatas ne evidente al la perceptebla mondo.

Ekzistas tamen la aserto, kiu staras ĝuste kontraŭ nia propono. Temas pri tiu de Chomsky (1988) kaj liaj samskolanoj. Jen la ekzemplo:

"... provu difinadon al tia vorto kiel 'tablo' aŭ 'libro' aŭ io ajn, vi tiam trovas tion ekstreme malfacila. Ekzemple, fakte troviĝas lingvistika revuo lastatempa, kiu enhavas en si longan kaj detalan artikolon, kiu provas klarigi la signifon de la vorto '*climb*' (supreniri). Fakte, la signifo de la vorto estas tre komplika. *Tamen ĉiu infano tuj lernas ĝin perfekte.* Tiu ĉi atingi signifas nenion alian ol tion, ke homnato senkoste donas al ni la koncepton '*climb*'. Alivorte, la koncepto '*climb*' ĝuste konsistigas parton de la maniero, en kiu ni kapablas interpreti sperton, disponebla al ni antaŭ ol ni havas eĉ tian sperton" (Chomsky, 1988, p.190-191)² (kursivigo donita de Nagata).

Nenie ekzistas empiriaj pruvoj, ke ĉiu infano tuj kaj perfekte lernas la signifon de iu vorto. Se ne plene scias ĝin eĉ plenkreskuloj, inkluzive lingvistoj, tiam estus plej nature supoziti, ke ankaŭ infanoj ne plene ĝin scias. Laŭ nia vidpunkto ĉi tiea, lia konceptado de la problemo devas renversiĝi. Li prenas lingvouzadon de infanoj kiel lingvoscion. Ni proponu, ke infanoj povas montri surface plenan kapablon manipuli sian lingvon, eĉ se ili ne plene scias ĝin. Ilia kapablo de lingvouzado ne egalas al la perfekta lingvoscio. Estas vere, ke Chomsky (1986, 1988) ofte distingas inter lingvaj kapabloj (*language abilities*) kaj lingvoscio (*language knowledge*). Tamen li skizas ĉiukaze la kapablojn kiel malperfekta kaj la lingvoscion perfekta, donante pli da realeco al la lingvoscio ol al la lingvokapabloj, malgraŭ ke la lingvoscio estas nenio alia ol la idealigita koncepto.

Fundamenta skemo por postuli universalan gramatikon (vd. Nagata, 1997) por Esperantlingva klarigo ankaŭ malfortiĝus, se ni

² Estas bone konate, ke Chomsky interpretas konceptojn specife lingvistikajn kiel denaske donitaj. Ni substreku, ke tiun ĉi konceptadon li aplikas ne nur al la lingvistikaj konceptoj sed ankaŭ al tiuj ne specife lingvistikaj.

rigardas ĝin laŭ la vidpunkto de la nuna artikolo. Nia serioza dubo koncernas nur tion: ĉu efektive stabila estas la fina stato, tiel riĉa en enhavo ke ĝi devigas nin postuli perfektan lingvoscion.

V. Konkludo

Difini vortojn per aliaj vortoj postulas de la difinantoj alian kapablon metalingvistikan ol la kapablon simple uzi vortojn en komprenado kaj produktado. Tiu ĉi artikolo prezentis ekzemplajn difinadojn, kiujn produktis 3-jara infano (knabino) pri 10 vortoj, plejparte senerare uzitaj. Sia difinado de adverboj estis aparte notinda pro tio, ke ĝi ne estis difinado en aŭtentika senco, sed nur inkludis la krizan vorton enmetitan en la frazo, kiun ŝi donis kiel difinado-respondon. Ne ekzistis nepara rilato inter la kriza vorto kaj aliaj vortoj en la frazo. La difinado de tiu speco observiĝis, kvankam tre malmulte, ankaŭ ĉe plenkreskuloj.

Plue, la plenkreskuloj ofte difinis la adverbojn per ties sinonimoj. Ĉar ili libere uzas tiujn adverbojn, tial sekvas, ke uzado de vortoj ne implicas plenan posedon de ties vortoj. Tiu ĉi problemo aplikeblas plue al la rilato inter lingvouzado kaj lingvoscio. Staras nun tezo eslorenda, nome: eĉ plena lingvouzado ne nepre postulas riĉan lingvoscion. La tezo formus alternativon al tiu laŭ Chomsky: lingvouzado eĉ ne perfekta nepre postulas lingvoscion plenan, pli precize, riĉan. Neniom neigebblas, ke la nunaj donitaĵoj, precipe tiuj por la infano, ne estas akiritaj kun sufiĉe da esplorcelo, kaj ke necesas pluj studoj multe pli sistemaj. Tamen la trovaĵoj montras eblan rilaton inter lingvouzado kaj lingvoscio, unu el la ĉefaj problemoj al kiuj sin direktas multe da nuntempaj lingvistoj kaj psikolingvistoj.

Referencoj

- Al-Issa, I. (1969). The development of word definition in children. *Journal of Genetic Psychology*, 114, 25-28.

- Chomsky, N. (1986). *Knowledge of language: Its nature, origin and use*. Praeger, New York.
- Chomsky, N. (1988). *Language and problems of knowledge*. Cambridge, Mass., MIT Press.
- Clark, E. V. (1978). Awareness of language: Some evidence from what children say and do. En A. Sinclair, R. J. Jarvella k W. J. M. Levelt (Red.), *The child's conception of language* (p. 17-43). Berlin, Springer-Verlag.
- Flores d'Arcais, G. B. (1978). Levels of semantic knowledge in children's use of connectives. En A. Sinclair, R. J. Jarvella k W. J. M. Levelt (Red.), *The child's conception of language* (p. 133-153). Berlin, Springer-Verlag.
- Gombert, J. É. (1990). *Le développement métalinguistique*. Paris, PUF.
- Hakes, D. T. (1980). *The development of metalinguistic abilities in children*. Berlin, Springer-Verlag.
- Hirsh-Pasek, K., Gleitman, L. R. k Gleitman, H. (1978). What did the brain say to the mind? A study of the detection and report of ambiguity by young children. En A. Sinclair, R. J. Jarvella k W. J. M. Levelt (Red.), *The child's conception of language* (p. 97-132). Berlin, Springer-Verlag.
- Iŭabuĉi, E. k Muraiŝi, S. (1976). *Jooĉi no joogo*. (Vortoj uzitaj de infanoj.) Tokio, Nihon Hooso Ŝuppan Kjookai.
- Levy, E. k Nelson, K. (1994). Words in discourse: A dialectical approach to the acquisition of meaning and use. *Journal of Child Language*, 21, 367-389.
- Litowitz, B. (1977). Learning to make definitions. *Journal of Child Language*, 4, 289-304.
- McGhee-Bidlack, B. (1991). The development of noun definitions: A metalinguistic analysis. *Journal of Child Language*, 18, 417-434.
- Nagata, H. (1997). Kernvorto-parametro en genera gramatiko: Apliko al eldiroj de infanoj denaske lernantaj Esperanton. *Scienca Revuo*, 48, 34-43.
- Nelson, K. (1974). Concept, word, and sentence: Interrelations in acquisition and development. *Psychological Review*, 81, 267-285.

- Nelson, K., Hampson, J. k Shaw, L. K. (1993). Nouns in early lexicons: Evidence, explanations and implications. *Journal of Child Language*, 20, 61-84.
- Pratt, C. k Grieve, R. (1984). Metalinguistic awareness and cognitive development. En W. E. Tunmer, C. Pratt k M. L. Herriman (1984). *Metalinguistic awareness in children* (p. 128-143). Berlin, Springer-Verlag.
- Slobin, D. I. (1978). A case study of early language awareness. En A. Sinclair, R. J. Jarvella k W. J. M. Levelt (Red.), *The child's conception of language* (p. 45-54). Berlin, Springer-Verlag.
- Swartz, K. k Hall, A. E. (1972). Development of relational concepts and word definition in children five through eleven. *Child Development*, 43, 239-244.
- Tunmer, W. E. k Bowey, J. A. (1984). Metalinguistic awareness and reading acquisition. En W. E. Tunmer, C. Pratt k M. L. Herriman (1984). *Metalinguistic awareness in children* (p. 144-168). Berlin, Springer-Verlag.
- Tunmer, W. E., Pratt, C. k Herriman, M. L. (1984). *Metalinguistic awareness in children*. Berlin, Springer-Verlag.
- Vygotsky, L. S. (1962). *Thought and language*. Redaktita kaj tradukita de E. Hanfmann k G. Vakar. Cambridge, Mass., MIT Press.
- Watson, R. (1985). Towards a theory of definition. *Journal of Child Language*, 12, 181-197.
- Wehren, A., de Lisi, R. k Arnold, M. (1981). The development of noun definition. *Journal of Child Language*, 8, 165-175.
- Werner, H. k Kaplan, B. (1963). *Symbol formation*. New York, John Wiley & Sons, Inc.
- Wolman, R. N. k Barker, E. N. (1965). A developmental study of word definitions. *Journal of Genetic Psychology*, 107, 159-166.

Adreso de la aŭtoro:

Hiroshi NAGATA - Professor of Psychology
Fakultato de Ekonomio, Okayama University
3-1-1, Tsushima-naka - OKAYAMA 700-8530 - JAPANIO
Retpoŝto: hinagata@itan.okayama-u.ac.jp